





BOHEMA REVUO ESPERANTISTA

kun literatura aldono

LEGOLIBRO DE BOHEMAJ ESPERANTISTOJ

Oficiala organo de bohemaj Esperantistoj kaj de
CENTRA ASOCIO
BOHEMA UNIO ESPERANTISTA (B. U. E.)


Ni laboros por Esperanto.

CENTRA ASOCIO BOHEMA UNIO ESPERANTISTA. SÍDLO : PRAHA I. 342. KAVÁRNA „UNION". KANCELÁŘ A UČEBNA: II. VODIČKOVA ULICE 38. REDAKCE REVUE: II. DITTRICHOVA ULICE 7.

Členové klubů sdružených v „Ústředním Svazu Bohema Unio Esperantista" a těch, které za jeho součinnosti se ustavují, dostávají tuto revui za roční předplatné K 2·50 prostřednictvím pp. jednatelů. Roč. I.—IV. pro členy B.U.E. po K 2·20.
Klub Esperantistů v Praze („U Donátů") dává svým členům tuto revui zdarma.



1911. ČERVEN, ČERVENEC — JUNIO, JULIO. V. 6.



Roční předplatné: 3 K. Roč. I.—IV. po K 2·50. **Cena tohoto sešitu s přílohou: 30 hal.**

ČASOPIS ČESKÝCH ESPERANTISTŮ
BOHEMA REVUO ESPERANTISTA

vychází 10krát ročně (kromě srpna a září).

eliras monate (krom aŭgusto kaj septembro).

Redaktor: **Ed. Kühnl.**

Předplatné (ročně **3 K** pro Rakousko, Fr. 3·75 pro cizinu), a vše týkající se časopisu, budiž zasláno pouze na adresu: „Časopis Českých Esperantistů", Praha II.-2023, Dittrichova ul. 7. Redakce vyhražuje si právo upraviti články pro tisk. Netištěné rukopisy se vrátí, byla-li přiložena známka; pracem původním dána přednost.

Abonpago, akceptata por almenaŭ unu jaro (**Fr. 3·75** = 1·50 Sm por fremdlando, 3 K por Aŭstrio), kaj ĉio, kio koncernas la gazeton, estu sendata laŭ adreso:

„Časopis Českých Esperantistů" en Praha II. (Bohemujo - Aŭstrio). II.—2023. Dittrichova ul. 7.

La redakcio rezervas por si la rajton korekti la manuskripton por la preso; la nepresitaj manuskriptoj estos redonitaj, se oni almetis poŝtan markon. Originalaj artikoloj prefere akceptataj.

* Účet poštovní spořitelny 93.281. *

OBSAH — ENHAVO:

LITERATURA ALDONO: **BABIČKA-AVINETO** de Božena Němcová. (Pokr.). Trad. *Vl. Tobek.*

La III. Kongreso de Bohemaj Esperantistoj kaj la II. Konferenco de Aŭstriaj Esperantistoj. — *Ignát Hermann*: La Floro de hiskiamo. — Historio de Esperanto. — Propagatorům! — Lingva fako — Jazykový rádce. — Nia literatur konkurso. — Z celého světa. — Esperanta movado inter Bohemoj. — Korespondantoj.

La III. Kongreso de Bohemaj Esperantistoj

kaj

la II. Konferenco de Aŭstriaj Esperantistoj

okazos la 8., 9., 10. de septembro 1911

en Praha.

Laŭ la ĝisnunaj preparaj laboroj ni povas proklami la programon anoncitan en la lasta n-o kiel definitivan. Malgraŭ tio, ke dum la tri elektitaj tagoj oni volas plenumi multe da laboro, tamen la tempo estos por ĉiu kunveno tiel fiksita, ke oni povu partopreni preskaŭ ĉiujn. Ni refoje atentigas pri nia antaŭa artikolo kaj precipe pri tio, ke ĉiuj proponoj devas esti senditaj al la prepara komitato antaŭ la 15. de aŭgusto. Oni sciigu al ĝi ankaŭ la temojn, pri kiuj oni volas paroli!

Legitimacio, kiu rajtigas partopreni ambaŭ konferencajn kunvenojn, kostas 1 K.

Sendu tuj vian aliĝon! (La sumon 1 K sendu en poŝtmarkoj laŭ adreso de „Centra Asocio Bohema Unio Esperantista" en Praha II. Vodičkova ul. 38.)

Ni povas kun ĝojo konstati, ke el la 140 bohemaj redakcioj, al kiuj ni sendis informon pri la konferenco, plimulto ĝin publikigis.

La komitato de la bohema kongreso invitas ĉiujn amikojn al esperantan teatra amuzo, kiu okazos sabaton vespere. Sur la programo krom recitaĵoj kaj muziko „Konkurantinoj", orig. unuakta ludo esperanta de f-ino B. Studničková kaj „All right", unuakta komedio de Štolba, trad. esperanten de Q. Ardeni. Enirpago 50 hel.

Na programu českého kongresu jest krom schůzí a přednášek též esperantská divadelní zábava (v sobotu večer) a zasedání zkušební komise Ústředního Svazu B. U. E.

Přihlášky ke zkouškám třeba zaslati v čas, aby mohla býti písemná část zkoušky pp kandidátům oznámena. Zkušební řád zasílá se zdarma. Přihlášeným již pp. kandidátům sdělí se podrobnosti zkoušky písemně a podle dohody, pokud se týče stanovení dne.

Cena kongresní legitimace, opravňující k účasti na schůzích rakouské konference se vstupenkou k divadelnímu představení 2 K.

Zašlete ihned svou přihlášku!

Sdělte výboru themata, o nichž chcete česky nebo esperantsky přednášeti!

Ignát Hermann:

LA FLORO DE HISKIAMO.

Ĉiufoje, kiam rapidis al fino la jaro en lernejoj, sinjoron Buddeus ekregis altgrada malkvieteco.

Kaj kiam la lernejoj malpleniĝis kaj estis fermitaj, kiam malaperis la grupoj da infanoj antaŭ ili, kaj nur unuope la buboj trakuradis kun paperaj flugludiloj la stratojn, kiam en Praha multiĝadis la fermitaj fenestroj post kiuj la kurtenoj estis detiritaj, montrantaj, ke la loĝantoj diskuris en diversajn angulojn de kamparo, kiam ankaŭ en lia ĉiutaga gastejo malmultiĝis la vico de ĉiutagaj vizitantoj, de kiuj poste alvenadis humorplenaj salutoj el la urboj kaj vilaĝoj, kiam la varmego pligrandiĝis kaj tutan Praha'n ekposedis dormemo kaj mallaboremo — nun sinjoro Buddeus ne plu restis jam trankvila. Li ankaŭ sopiris je libera forspiro, verdaj herbejoj, silenta arbaro, kampara rivereto, je odorantaj matenoj kaj longa, nesubita krepuskiĝo dum kiu de ne tro alta turo de la vilaĝo malsuprenportas sin la vespera sonorado en la vastan, ekdormantan pejzaĝon.

Tiam unu tagon li decidiĝis de, ekfrapis la pordon, post kiu sidis lia estro, eniris kaj sufiĉe embarase li diris:

„Mi petus ree mian forpermeson, moŝta sinjoro, kvar semajnojn.“

La estro cetere atendis lin ĉiutage. Sinjoro Buddeus estis eminenta laboranto, konscienca, diligenta. Dum la tuta jaro li eĉ minuton ne preterlasis, ja eĉ la vesperojn li aldonadis, por esti preta kun sia laboro, por „hodiaŭ fari parton de la morgaŭa laboro,“ kiel li diradis. Li ĉiam estis la unua en la kontoro, kaj la lasta el ĝi li foriradis. Sed kune kun la malkreskantaj tagoj de la somero vekiĝis en li la sopiro pri kampara aero, kaj tiamaniere jam dum vico da jaroj li venadis al sia estro kun la peto pri forpermeso. Kaj la estro volonte ĝin al li donis. Tio estis ja eksterordinaraĵo, plenaj kvar semajnoj! Neniu en la etablismento ĝuis tian ekstravagancon. Sed fine eĉ ĉi tie kun la plej alta somero malmultiĝis la laboro: la devojn de sinjoro Buddeus dividos inter si liaj pli junaj kolegoj, kaj se io estos pokrastata — li tion ja post sia reveno kompensos. Tion sciis la estro. Kaj li sciis ankaŭ aŭ almenaŭ li supozis, ke sinjoro Buddeus, se li estus rifuzita, eksiĝus. Li estis iom stranga, kiel oni pri li diradis. Kaj lin la estro malpej volonte estus perdinta. Ĉar sinjoro Buddeus krom aliaj ŝatataj ecoj havis unu tre altŝatatan. De la tempo, kiam li akiris la salajron, kiu al li por lia modesta vivo estis sufiĉa, per kiu li sufiĉis kiel bona ekonomo, eĉ ne ekideis al li, ke li postulu plialtigon.

„Nu, kien do nunjare?“ demandis la estro ridetante.

„Nunjare al la niaj lagetoj, suden,“ respondis sinjoro Buddeus.

„Por la tutaj kvar semajnoj, neniun flankvojaĝon? sinjoro Buddeus?“

„Ne, mi petas. Pli bone estas sidiĝi kaj resti sur unu loko. Tiamaniere oni plej bone ripozas.“

„Nu, veturu, veturu, sinjoro Buddeus. Kaj kiam do?“

„Mi petus morgaŭ. Mi jam prepariĝis kaj de postmorgaŭ post kvar semajnoj ree mi estas en la kontoro.“

„Bone, bone. Mi scias, vi estas akurateca. Fartu tie bone, sinjoro Buddeus.“

La estro prezentis al li la manon, sinjoro Buddeus adiaŭis vespere la amikojn kaj la duan tagon matene li elveturis el Praha.

*

Sinjoro Buddeus ordinare revenis en Praha'n regule unu tagon pli frue, antaŭ ol finiĝis lia libertempo. Li deziris havi la restantan tagon tute por si mem, por en Praha denove fariĝi hejme, por kutimi la pli pezan aeron, por „ordometi sian loĝejon“ kvankam tie ne estis multe por ordometi, ĉar lia maljun-fraŭla ĉambro estis ĉiam tenata plej penplene en ordo. Kaj tial, lastafoje li revenis sabaton vespere — restis al li tuta dimanĉo. Antaŭtagmeze li vagadis tra Praha, posttagmeze li intencis resti hejme. Tiamaniere li vivis dum la tuta jaro, dimanĉe posttagmeze li tute ne eliradis.

Tiun tagon vizitis lin en pli malfrua posttagmezo du malnovaj amikoj. Ili kalkulis la dimanĉojn de lia foresto, kaj ili supozis, ke hodiaŭ li jam estas hejme. Ili ne eraris, ili trovis lin.

Ili sidis kun li dum unu horo, kaj demandis, kiel li pasigis sian libertempon. En la unuaj tagoj post sia reveno estis ĉiafoje sinjoro Buddeus iel laca, senvigligita. La efiko de la restado en kamparo montriĝis ĉiam pli malfrue. Tiun ĉi fojon tamen estis la maljuna kunulo laŭaspekte pli lacigita ol kutime. Post la horo de interparolado disiris do la amikoj, el kiuj unu kun ekrideto rimarkigis:

„Ni do ree iras nian vojon, kaj vin ni ĉi tie lasos — kun viaj pensoj“ . . .

Sinjoro Buddeus ankaŭ ekridetis, sed iel seninterese, kaj respondis:

„Tiam mi estos tre izolita. Mi tute ne havas pensojn.“ . . .

Kaj li riglofermis la pordon post la kamaradoj per riglilo.

Sinjoro Buddeus ne parolis veron. Ĝuste post la reveno el kamparo li ĉiam havis da pensoj strangaj aregon, sed veron li

diris, ke tio ne estis societo gaja. Ĉar sinjoro Buddeus pensis pri la pasinteco.

Kaj denove li rememoradis tiun ĉi fojon. Li ne konfesis al la amikoj, ke li hodiaŭ solenas sian kvardekan naskiĝotagon. Ili estus lin gratulintaj — ne estis kaŭzo. Li rigardis en la spegulon kaj vidis, kiel al li la tempioj rapide griziĝas; li rigardis la frunton kaj vidis, kiel ĝi per du anguloj plilarĝiĝas al la verto. Estis la kvina horo kaj sinjoro Buddeus rememoris, ke ĝuste en tiu horo antaŭ kvardek jaroj li ekvidis la lumon de la mondo, kiel al li la mortinta panjo rakontadis.

Do kvardek!

La junaĝo formalaperis, li enpaŝis la kvindekon.

Sinjoro Buddeus loĝis en ĉambro, kiu verŝajne iam estis ĉambro infana. Restis en ĝi la ŝirma krado, kiun neniu post la transloĝiĝo forigis. Ankaŭ al sinjoro Buddeus tio neniam venis en la penson. Hodiaŭ tamen ĝi ĝenis lin. Li rigardis en kortojn kaj ĝardenojn, en la kortojn malplenajn, silentajn, en la ĝardenojn velkantajn kaj flaviĝantajn. Li ŝajnis al si mem esti kvazaŭ besto en kaĝo kaj en li vekiĝis melankolia humoro.

Li malfermis la tirkeston de sia tablo kaj transĵetadis malnovajn leterojn, folietojn de memorlibroj, kies inko ĉiam pli kaj pli griziĝis, li trovadis elŝiraĵojn de iaj poemoj, kiujn li longe jam forgesis, kaj fine li malfermis la kesteton, plenan da diversaj portretoj.

Por momento li haltis ĉe la sia. Tiu estis lia lasta; de tiu tempo li ne sidis antaŭ la fotografa aparato. Tiam li estis dudekkvarjara. Sinjoro Buddeus maldolĉe ekridetis. Kiom tiam ankoraŭ li ĝojis, ke li estas plenaĝa, ke li estas memstara, ke li estas viro! Ho, kiel tio estis bagatelaĵa ĝojo! Kian profiton li havis de tio? Kion li donus por tio, se li povus denove travivi la junecon, se revenus al li la jaroj dudekaj!

Li apenaŭ sin rekonis. Kvazaŭ rigardus lin el la portreto vizaĝo nekonata. Tiu estis junulo de malgrasa, nepleniĝinta ankoraŭ vango sen difinita esprimo, kun maldensaj lipharetoj sub la nazo, sed kun densaj, longaj, krispaj haroj sur la kapo. Tiuj haroj! Kiel en ilin foje enfosiĝis ies manoj! Kaj tiujn ĝuste li tute ne ŝatis. La mano, kiun li nur unu fojon dum sia vivo kisis, kiun li sopiris, kiu en sonĝoj lumis al li per sia blanko — tiu mano neniam ilin karesis.

Li turnis la portreton. Estis sur ĝi — ankaŭ jam per skribo paliĝinta — dediĉo al knabino.

„Al fraŭlino Julinjo“ kaj lia subskribo kaj datumo.

Li ricevis ĝin returnen.

Sinjoro Buddeus formetis la portreton kaj prenis koverton, el kiu li elprenis alian bildeton.

Ĝi estis portreto de bela knabino. Malgranda, tamen energioplena buŝeto estis firme kunpremita, grandaj okuloj rigardis serioze en la mondon.

Sinjoro Buddeus rememoris al si, kiom li humile devis petegi pri tiu ĉi portreto. Fine li ĝin ricevis, sed tio estis ĉio. Sur la malantaŭa flanko estis eĉ ne unu vorto.

Li denove elmetis el la koverto folieton da rigida papero, en sama grandeco, kiel la portreto. Tiun bileton li fikse ekrigardis. Sur ĝi estis algluita — floro de hiskiamo, sub ĝi per krajono estis skribita la tago kaj la jaro.

La floro estis zorge premsekigita, maldiketa kvazaŭ araneaĵo kaj jam de longe ĝi perdis sian originalan koloron. Ĝi estis preskaŭ bruna.

Por sinjoro Buddeus ne estis necesa la datumo. Li bone memoris tiun tagon.

Tiam ankaŭ kliniĝis al fino la somero, kiel nun. Sinjoro Buddeus estis invitita en proksiman somerloĝejon apud Praha, en gojan societon, por ludi keglojn. Li ludis, sed pri la ludo li ne pensis. Kiom teda estis por li tiam tiu amuzado, kiom malagrable sonis al li la gajaj kaj senĝenaj ekkrioj de la kunuloj!

Kompreneble, li prefere estus sidinta en proksima laŭbo kie sidis super libro ŝi – Julinjo. Fine tamen li profitis paŭzon en la ludo, li malaperis de la keglejo kaj rapidis al la laŭbo.

Kvazaŭ ŝi estus antaŭsentinta lian alvenon kaj intencon, eliris ĵus el la laŭbo knabino, kiu lin jen rigardas el la portreto. Kvazaŭ ŝi intencus malhelpi, ke li kun ŝi dum momento restu zolita kaj kaŝita antaŭ la okuloj de aliaj. Kvazaŭ ŝi timus antaŭ tiu momento.

Li tamen trovis en si tiom da kuraĝo, ke li ŝin demandis, ĉu li povas kune kun ŝi reveni en la laŭbon, ĉu li povas iomete sidi kun ŝi, ĉu li povas ion diri al ŝi.

En la sama momento eksonis de la keglejo lia nomo. Oni serĉis lin, oni lin vokis.

Eĉ ne respondinte lian demandon, ŝi diris al li:

„Oni vin serĉas — iru ludi . . .“

„Eĉ ne vorton plu, fraŭlino?“ demandis tiam sinjoro Buddeus.

Kaj ankoraŭ nun, kiam li ekpensis pri tio, li eksentis, kiel la varmego lin superverŝis.

„Ĉu mi ne rajtas paroli? Ĉu vi ne volas aŭskulti min? Ĉu vi ne respondos al mi?“

La knabino kliniĝis kaj deŝiris floron de malklara, malpura koloro.

Prezentante ĝin al li, ŝi diris:

„Iru — ludu keglojn — vi mankus al ili . . .“

Prenante la floron, li ekkaptis ŝian manon, kiun li kisis. Li ne rimarkis dum tiu momento, kiel ŝi la manon detiris, li ne komprenis tion.

Sed poste, revenante al la kegloludo, li ekrigardis la floron kaj li paliĝis. Floro de hiskiamo!

Trad. Fr. Dus. *(Daŭrigo.)*

HISTORIO DE ESPERANTO

Jam en la aprila numero de nia revuo ni parolis pri la bezono doni al kandidatoj por la ekzameno pri Esperanto ĉiun bezonan studmaterialon en formo de broŝuro, kiu enhavus respondojn je demandoj, kiuj estos al li donitaj. Ni komencis enpresadi artikolojn pri la vastiĝado de Esperanto en diversaj landoj laŭ tio, kion oni respondis je niaj informopetoj dissenditaj ĉiulanden kaj ni esperis, ke pli-malpli frue estos eble verki esperante pli ampleksan libron kun temoj utilaj speciale por la kandidatoj. Ne pasis multe da tagoj kaj jen ni ricevas kun plezuro broŝuron, kiu kontentigas nin plenmezure per sia riĉa enhavo, kiu estas vere esenco de ĉio, kion oni devas scii, se oni volas esti certa pri la sukceso ĉe la ekzameno . . . Ĝi estas libreto de s-o R. de Ladevèze el Hamburg, kiun li verkis helpe de la germanlingva broŝureto de Winkelmann „Der Esperantismus“: **Demandaro pri la historio, literaturo kaj organizaĵoj de Esperanto por la esperantaj ekzamenoj.“** (Eld. Fr. Ader, Esperanto-Verlag, Dresden A. Prezo 1 M). Sur okdek paĝoj oni trovas resumon de la ĉefaj ideoj interesaj por ĉiu amiko de nia lingvo. La enhavo estas dividita je sep ĉapitroj, kiuj traktas pri la historio de la ideo pri internacia lingvo, historio de Esperanto, lingvaj organizaĵoj, nelingvaj organizaĵoj, gazetaro, literaturo kaj nuna stato de la movado. Multaj elĉerpaĵoj el la verkoj de nia Majstro, kiuj rilatas la historion de Esperanto kaj klarigaj rimarkoj de la aŭtoro kompletigas la rekomendindan verkon. Ni supozas, ke neniu esperantista klubo forgesos tuj mendi la verketon por ebligi tiel al sia membraro la detalan studon de nia movado.

PROPAGATORŮM.

V časopise „Paris Esperanto“ uveřejňuje vrchní ing. Rollet de l' Isle užitečné statě ve způsobu odpovědí na otázky, které nejčastěji bývají pro-

pagatorům Esperanta kladeny. Pro jejich zajímavost a praktickou cenu otiskneme některé v překladu českém.

Námitka 1. **Jest mezinárodní jazyk potřebným nebo dokonce užitečným?**

Zdokonalování dopravních prostředků hlavně za poslední století zvýšilo styky mezinárodni a rozšířilo pole činnosti všech civilisovaných lidí. Ihned objevila se snaha zužitkovati toto pole a vytěžiti z něho všechen možný intellektuelní a materielní zisk; ale v zápětí poznala se dosud nepřekonaná překážka — různost jazyková. Tato překážka jest proto tím mocnější, že nynější hnutí nabádá všechny národy – hlavně národy menší — aby rázně hájily svůj jazyk, který představuje jejich duševní nezávislost; šíření nauk a demokratisující ruch zvětšuje počet těch národů, s nimiž stýkati se jest s prospěchem a jejichž jazyk jest tudíž nutno znáti. Majíce na mysli všechny kategorie lidí, ukážeme těmito důvody: předně theoretikům, že rozšiřování lidských myšlenek celým světem za hranice země, v níž se zrodily, zvýší do nekonečna jejich moc, že znalost myšlenkového hnutí všech národů, kterou bude moci míti každý člověk, umožní působivou spolupráci všech myslitelů, že tato spolupráce, jejíž nutnost dala již vznik četným mezinárodním organisacím a vytvořila obdivuhodné výsledky — nevyhnutelně urychlí intelektuelní a tudíž i materielní pokrok neočekávaným způsobem. Za druhé ukážeme praktikům, že se získá obrovská úspora na energii a čase tím, když nebude nutno učiti se cizím řečem a z nich překládati; že ústní a bezprostřední jednání o hmotných zájmech přivodí nevyhnutelně zisk, jaký žádná jiná methoda nemůže poskytnouti; konečně že dokonalé porozumění zrodí přirozeně lidumilné city, z nichž nepochybně vyplyne zlepšení povšechného materielního stavu lidstva.

Námitka 2. **V otázce jazyka mezinárodního lidé nikdy se neshodnou?**

Předně poukazujeme na mezinárodní dohody vlád, které podařilo se před nějakým časem uskutečniti. První takovou dohodou jest mezinárodní signalisační systém námořní, poslední pak mezinárodní system časoměrný. Mezi touto dobou bylo dosaženo různých úmluv o poště, telegrafu, obchodě a j. a nyní jedná se o mezinárodní systém metrický. Zda není tatáž methoda, které užily vlády pro dosažení těchto úmluv užitelna také pro otázku mezinárodního jazyka? Zajisté že ano. Ve jmenovaných případech vlády přijaly systémy pokusně vyzkoušené nebo takové, kterých národové nutně vyžadovali. Nic nepřekáží, aby stejně udělaly s jazykem mezinárodním, ovšem s podmínkou, aby jazyk ten byl již zvolen a národy užíván; vlády vždy všímají si skutečných fakt.

A toto bude se díti jako obvykle: zprvu dvě z těchto vlád dohodnou se o užívání tohoto jazyka pro vzájemné styky a prohlásí vyučování tomuto jazyku officielním; potom dříve nebo později i jiné vlády přistoupí k této úmluvě. Zbývá tedy otázka: jsou národové schopni vlastní iniciativou dohodnouti se na jednotném jazyku mezinárodním? Na tento problém možno hleděti s dvojí strany: jazykové a sociální. Bude rozluštěn pouze tenkráte, když na jedné straně bude existovati vhodný jazyk, na druhé pak světová dohoda o výhradním užívání tohoto jazyka. Dnes jest rozluštění jazykového theoreticky i prakticky dosaženo. V theorii jest uznáno, že jazyk mezinárodní musí býti umělý a pokud možno nejsnazší pro všechny civilisované lidi průměrného vzdělání. Prakticky jest otázka rozřešena Esperantem: protože však nelze theoreticky stanoviti s přesností nejlepší rozluštění, neznamená to, že Esperanto všestranně vyhovuje i nejpřísnějším, nedosažitelným požadavkům theorie, ale blíží se tou měrou tomuto nejlepšímu rozřešení, že po této stránce třeba otázku považovati za prakticky rozluštěnou — a zabývati se pouze řešením problému po stránce sociální. Kdybychom jednali jinak, oddálili bychom toto rozřešení na dobu nedohlednou. Dosažení dohody jest ostatně zcela nezávislé na větší či menší dokonalosti rozluštění lingvistického; chce pouze zavésti mezi lidi zvyk, aby jazyk mezinárodní užívali. Když toho bude dosaženo, pak lze beze strachu příjmouti dokonalejší jazykový doplněk — bude-li jaký — protože lidé vynaloží vše, aby si zachovali prospěch, na který zvyknou si užíváním mezinárodního jazyka. Vidíme tudíž, že otázka jest jen sociální a nikterak již jazyková a že národové mohou ji velmi snadně rozluštiti, pochopí-li tyto velmi jednoduché myšlenky. Ostatně počínají je stále lépe chápati a úkolem propagatorů jest pracovati v tomto směru.

LINGVA FAKO — JAZYKOVÝ RÁDCE.

Počet přihlášek na podrobný česko-esperantský slovník, o němž bylo mluveno v 1. č., daleko ještě nedosahuje té výše, aby alespoň částečně byl potřebný náklad zabezpečen. Vyzýváme proto znovu každého, kdo vidí potřebu tohoto díla, aby v nejbližší době nám zaslal svou přihlášku a nespoléhal pouze na to, že knihu zakoupí — až vyjde. Vydání slovníku závisí pouze na počtu přihlášek!

Jako ukázku obsažnosti díla přinášíme na tomto místě úryvek ze dvou míst:

býti *esti, ekzisti;* (nacházeti se) *troviĝi;* (přihoditi se, konati se) *okazi;* (státi se) *fariĝi;* (patřiti) *aparteni;* jak jest vám? *kiel vi*

fartas; co jest vám? *kio mankas al vi?* je tomu pět let *pasis kvin jaroj de*; — dlužen *ŝuldi*; — hoden *meriti*; — nehoden *malmeriti*; — hladov *malsati*; — na stráži *gardostari*; — na vahách *ŝance iĝi*; — na živu *vivi*; — nepohodlným *ĝeni, ĝedi*; — případným *konveni, deci*; — pro (něco) *konsenti (pri)*; — rozhorlen *koleri, indigni*: — uprázdněný *vaki*; — s to *(sci)povi, kapabli*; — shovívavým *indulgi*; — si vědom *konscii*; — smuten *malgaji*; — těžkým *pezi*; — v cestě *bari, kontraŭstari*; — ve při *disputi, malpaci*; — ve psí *fiaski, mizere vivi*; — vesel *gaji*; — vhod *plaĉi, konveni*; — umíněným *obstini*; — zač *kosti, valori*; — zle *senti naŭzon*; — stár 5 r. *havi aĝon de . . ., esti kvinjara*.

co *kio* (4. pád *kion*); kolik *kiom*; co na tom? *ĉu grave? ĉu tio estas grava?* co to? *kio ĝi estas?* co že? co pak? *kion (vi diras, vi deziras)?* co se týče toho *koncerne tion, rilate tion, pri tio*; co den *ĉiutage, tagoregule, konstante*, co nejvíce, nejdříve, nejrychleji *kiel eble plej (la plej) multe, frue (baldaŭ), rapide*; co nevidět *post nelonge, tuj*; co noha nohu mine *malrapidpaŝe, paŝo post paŝo*; cokoliv *kio ajn*; co Čech, to Sokol *kiu Bohemo, tiu Sokolo, kiom da B. tiom da S.*

Vazba sloves v Esperantu se 4. pádem: Neukazuje-li smysl věty dosti jasně, které předložky užíti, užijeme pomocné předložky *je* nebo 4. pádu bez předložky, tudíž helpi al iu = helpi iun. V kursu lze objasniti toto pravidlo příklady, které poukazují na způsob překládání a vazbu synonym (slov stejného významu): *kompreni iun* rozuměti někomu, chápati někoho; *riproĉi iun* vytýkati někomu, kárati někoho; *kredi iun* věřiti někomu, věřiti v někoho; *respondi ion* odpověděti k něčemu, na něco, zodpověděti něco; *servi iun* posloužiti někomu, obsloužiti někoho; *malhelpi ion* zabrániti něčemu, překaziti něco; *adori iun* klaněti se někomu, vzývati někoho. Pozor na věty: *riproĉi al li eraron* a pod. (viz Meth. Kühnlova str. 39. dole). Srovn. *sciigi ion al iu*: *sciigi iun pri io* — sděliti něco někomu: zpraviti někoho o něčem.

En la „Pola Esperantisto" estis anoncita interesa konkurso **pri la uzado de la prepozicio „je"**, kiu donis tute kontentigan rezultaton. Oni alsendis grandan vicon da frazoj, en kiuj la uzo de tiu ĉi prepozicio estis ĝusta kaj ofte necesa. Tamen, ĉar oni povas en multaj okazoj anstataŭi la prepozicion „je" per alia, la redakcio anoncis nun la duan parton de tiu ĉi konkurso: oni montru, kiuj aliaj prepozicioj povus esti uzitaj anstataŭ la nomita. Laŭ la sekvantaj ekzemploj oni trovas, kiam estas bezone kaj kiam eble uzi la prepozicion „je". Certe por la studantoj de Esperanto tiu ĉi leciono estos utila:

Mi sopiras je mia perdita feliĉo. Bažím po svém ztraceném štěstí. - Mi okupas min je ĥemio. Zabývám se chemií. - Mi ne povas respondi je tio ĉi. Nemohu na toto odpověděti. - Mi ne estas kontenta je via konduto. Nejsem vaším chováním spokojen.

Mi esperas je via subteno. Spoléhám na vaši podporu. - Vi veturos je miaj kostoj. Pojedete na mé útraty. - Mi malsanas je la okuloj. Jsem nemocen na oči. - Je la unua rigardo ĝi ŝajnas facila. Na první pohled zdá se to snadné. - Mi suferas je okulmalsano. Trpím očním neduhem. - Via letero abundas je multaj eraroj. Váš dopis oplývá mnoha chybami. - Mi proksimiĝis al li je kelke da paŝoj. Přiblížil jsem se mu na několik kroků. - Via bieno estas riĉa je arbaroj. Váš statek jest bohatý na lesy. - Mi juras je Dio. Přísahám u Boha. - Je kioma horo? V kolik hodin? - Kredi je Dio. Věřiti v Boha. - Je duono pli. O půl více. - Konforme je postuloj de scienco. Podle požadavků vědy. - Edziĝi, edziniĝi je iu. Oženiti se, vdáti se za někoho. - Respondi al iu je io. Odpověděti na něco. - Senigi iun je io. Zbaviti někoho něčeho. - Simila, simili je . . . Podobný, podobati se něčemu. - Kalkuli je dek fingroj. Počítati na 10 prstech. - Li forkuris, kiam mi ekkriis je li. Utekl, když jsem vzkřikl na něho. - Mia kredo je homoj. Moje důvěra v lidi. - Ili kulpigis min je herezo. Obvinili mne z kacířství. - Li estas kontenta je mi. Jest mnou spokojen. - Plena je deziroj. Pln přání. - Li kaptis aglon je flugiloj. Chytil orla za křídla. - Puto profunda je dek metroj. Studna hluboká na 10 metrů. - Mi alvenis je la tria. Přišel jsem ve tři. - Moki je homoj. Vysmívati se lidem. - Aludi je io. Zmíniti se o něčem. - Aspekti je homo. Vypadati na člověka. - Asekuri je incendo. Pojistiti na oheň. - Sorto estas avara je karesoj. Osud jest skoupý na laskání. - Plena je veneno. Plný jedu. - Meti je ies kredito. Dáti na něčí účet. - Blinda je okuloj. Slepý (na oči) očima. - Muta je bonaj vortoj. Němý na dobrá slova. - Butonumi je ĉiuj butonoj. Zapnouti na všechny knoflíky. - Je ies nomo. Ve jménu někoho. - Mi juras je mia honoro. Přísahám na svou čest. - Diferenco je kelke da kopekoj. Rozdíl o několik kopejek. - Dika je du metroj. Tlustý na dva metry. - Diskonti je 5%. Úrokovati 5%. - Ekzameni je io. Zkoušeti z něčeho. - Fanfaroni je io. Vychloubati se něčím. - Fieri je io. Býti na něco hrdý. - Je tri metroj pli ol mi volis. O tři metry více, než jsem chtěl. - Je oktavo pli multe. O oktavu více. - Gratuli je datreveno. Blahopřáti k výročí. - Mi indignas je vi. Opovrhuji vámi. - Influi je . . . Míti vliv na . . . . - Kalkuli je . . . Počítati (spoléhati se) na . . . - Koleri je iu. Zlobiti se na někoho. - Konkurso je premioj. Závod o ceny. - Kvitanco je telegramo. Stvrzenka na telegram. - Lama je dekstra piedo. Chromý na pravou nohu. - Senigi iun je lia honoro. Zbaviti někoho o jeho čest. - Paĝo je dudek linioj. Strana o 20 řádkách. - Tropleniĝi je io. Přeplniti se něčím. - Li okupas je unu rango pli altan oficon ol mi. - Má o stupeň vyšší postavení než já. - Soifo je ĝuoj. Žízeň po požitcích. - Malfermi kreditoj je sumo 100 K. Otevříti úvěr

na obnos 100 K. - Suspekti je ŝtelo. Podezřívati z krádeže. - Oni taksas tion dek mil frankoj. Cení se to na deset tisíc franků. - Vigla je animo. Čilý na duchu.

Podotýkáme, že není třeba v podobných případech nevyhnutelně užívati pouze předložky „je“, ale naopak: tyto vazby mohou prospěti hlavně začátečníkům, kteří neměli ještě dosti příležitosti čísti esperantské spisy, aby poznali, že nejlepší autoři co nejméně užijí této předložky a nahražují ji často buď 4. pádem nebo jinými: per, ĉe, laŭ, al, pro a pod. podle smyslu.

NIA LITERATURA KONKURSO.

Ĝis la fiksita dato alvenis sep laboroj, inter kiuj la unuan premion — portreton de Dr. Zamenhof — ricevis la verketo **„Konkurantinoj“** de f-ino B. Studničková el Praha, la duan — plenan kolekton de ĉiuj eldonaĵoj de nia redakcio — s-o Jos. Podlipský el Smíchov por sia tradukajo **„Prandeoo“**. La unue nomita originala teatrajo estos prezentita ĉe la nunjara kongresa festo en Praha kune kun la ludo „All right“, kiu meritas mencion.

Z CELÉHO SVĚTA.

VII. Světový kongres esp. v Antwerpách: Dosud přihlásilo se 1100 účastníků, ale lze očekávati, že největší počet přihlášek dojde tento poslední měsíc. V čestném výboru zasedají přední osoby městské správy, konsulové, poslanci, zástupci tisku, škol, vojska a významných spolků. — Literární konkursy byly obeslány 40 pracemi. Městská rada zakoupila pro mužstvo policejní stráže za 200 franků slovníky esp., které budou účastníkům kursů rozdány. Kromě divadelního představení „Kaatje“ připravují se hry „Kongresa Revuo“, „Devo de reĝo“ a „Por kvietaj personoj“. V prvé bude účinkovati přes 100 osob, většinou Esperantistů.

Esperanto a aviatika. U příležitosti závodního letu Evropou organisovaného pařížským denníkem „Le Journal“, náš stoupenec, Henry Farman, stavitel létadel, který první proletěl dráhu 1 km, sdělil pořádatelstvu letů tyto podrobnosti: každý jeho stroj má na spodních křídlech jako znamení dvě esperantské hvězdy, automobily jeho firmy, které budou letce doprovázeti, jsou opatřeny esperantskými vlajkami a ve velkých městech, kde jsou zřízeny garrage, bude každá označena esp. praporem. Závodů súčastní se čtyři Farmanovy dvojplošníky, zapsané pod čísly 22, 30, 59, 60. — **VIII. Kongres Esp.** bude pořádán v Krakově, kde pracuje se pilně na přípravách k výstavě, která má býti otevřena již v červnu t. r., aby upozornila veřejnost na význam Esperanta. Do programu kongresních zábav bude pojato též esperantské divadelní představení, jako tomu bylo dosud na ostatních sjezdech; naši polští přátelé zvolili k tomu cíli na návrh ředitele krakovského divadla Solskiho

vynikající dílo Slowackiho — „Mazepu“ a na doporučení ředitele lvovské opery Hellera Moniuszka — „Halku“. Oba texty jsou již v esperantském překladu zpracovány předním literátem esperantským A. Grabowskim, jehož mistrovské básně jsou nám nejlepší zárukou úplného úspěchu. V nejbližší době budou vydány tyto texty tiskem. — **Esp. průvodce** a informační listy byly již vydány téměř v 50 městech. Většina z nich vyšla v stejném formátu, tak že lze z těchto listů sestavovati podle potřeby cestovní příručky pro ten neb onen směr. Chce-li kdo cestovati na př. z Prahy do Londýna, dopíše si kanceláři U. E. A. do Ženevy o sbírku inf. listů z oněch měst, která leží na cestě a může se pak spolehnouti na to, že v každém nalezne přátele-Esperantisty, ochotné radou mu posloužiti. — U. E. A. vydává za redakce W. A. Voglera v Hamburku (ABCstrasse 52) přílohu ke svému časopisu „Esperanto“ pod názvem **Komerca Bulteno,** která jest orgánem Obchodní sekce tohoto světového svazu. V posledním čísle jest uveřejněna řada firem, které vydaly ceníky a oběžníky o svých výrobcích v Esperantu Jmenujeme mezi předními: Gaumont & Co. tov. fot. přístrojů v Paříži, Železárny Consett v Durhamu v Anglii, továrna na cigarety Kiriakidis v Samosu, cestovní kancelář Cook a Son v Londýně. Esp. šeková banka v Londýně, Podmokelská továrna na majoliku, továrna na automobily Clément Bayard v Paříži, sanatorium Bilzovo v Drážďanech, slévárna písma Deberny & Co. v Paříži. (Další význačnější příště.) — Na ostrově **Kubě** jest již založeno 17 esp. spolků a 16 místních časopisů uveřejňuje o Esp. články. — Podle statistiky mezinárodního esp. tiskařského svazu může dnes tisknouti **600 typografů** esperantskými literami. V Čechách tisknou esp. texty firmy: Dr. Baštýr v Praze, Stivín v Praze, Politika v Praze, Reis v Praze, Scholle v Chrudimi, Peřina v Hradci Králové a na Moravě Družstvo knihtiskárny v Hranicích. (Kiu ankoraŭ?) — **Chorvatský** spolek esp. vybízí všechny slovanské spolky esp., aby u příležitosti všesokolského sletu v Záhřebě (12. až 14. srpna) súčastnili se slavnosti, kterou uspořádají tamtéž na počest svých slovanských bratří. — Téměř pravidelnou může býti rubrika **subvencí,** kterými čelné korporace podporují snahy esperantských spolků: v posledním čase udělily podporu městské rady místním spolkům ve městech: Beaune 50 Fr., Saint-les-Citeaux 30 Fr., Bourg, Dijon, Macon, Louhans, Sens, Meursault, Tournes, Avignon, Florencie (obch. komora 100 L), St. Denis 100 Fr. a j. — Časopis **„Il Piccolo“ v Terstu** dotázal se vynikajících osobností všech národů, na čem chtějí pracovati v roce 1911; odpověď dr. Zamenhofa byla otištěna ve jmenovaném časopise esperantsky. — V Německu již druhý časopis vydává zvláštní esperantskou přílohu: „Das Echo“ v Berlíně (měsíčně) a „Deutsche Warte“ (týdně). — Za přítomnosti knížete-vladaře Em. Kopassise byla konána v paláci **samoském** ustavující schůze dámského esp. spolku, který byl založen na popud kněžny Heleny. — Svaz „Novangla Asocio v **Bostonu“** obdržel pozvání od Manchesterského ústavu pro vědy a umění, aby příští sjezd byl uspořádán v tomto městě. Valná hromada přijala toto pohostinství jednohlasně. — **Washington** stal se dík poslednímu kongresu střediskem esp. hnutí severoamerického. Vždy rostoucí agenda vyžádala si již i rozšíření místností svazu, které byly otevřeny domácí slavností za účasti téměř sta osob ve 14. tř. 2404. — V katalogu **university stanfordské** v Kalifornii jest oznámen kurs Esperanta, jemuž bude oficielně vyučováno již v příštím semestru. — Nový český klub esp. byl založen v **Omaze**

(Nebr.) „Amerika Esperantisto“ vybízí k navázání styků s tímto klubem, který, jak doufá, získá Esperantu v českých kruzích dosti přízně. Kurs pořádaný každý pátek vede p. Rud. Honomichl 1433 So. 14 th. St.

Ústřední Esp. Kancelář v Paříži vydala zprávu o **Mezinárodním Museu** založeném loňského roku světovým kongresem mezinárodních svazů v Bruselu, pokud se týče sekce esperantské. Zpráva obsahuje vedle úvodníku gen. Seberta výstavní katalog a zajímavé statistické tabulky o rozvoji Esperanta. Museum jest umístěno v paláci Cinquantenaire v Bruselu. Publikace, které mají býti zde uloženy, buďtež zasílány ve dvou ex. kanceláři Esperantista Centra Oficejo v Paříži, 51 rue de Clichy. — Šestý Kongres upozorňuje všechny spolky, že předplácení měsíčníku „Oficiala Gazeto Esperantista“ jest jedním z nejlepších prostředků, kterak finančně pomoci officielním institucím esperantským a při tom býti pravidelně o jejich pracech informovánu.

ESPERANTA MOVADO INTER BOHEMOJ.

SJEZD ESPERANTISTŮ NA KLADNĚ

u příležitosti jub. dělnické výstavy bude pořádán v neděli dne 27. srpna t. r. místním klubem Esperantistů.

Program: Uvítání esp. spolků a hostí. Prohlídka města a průmyslových závodů. Společný oběd. Prohlídka výstavy. Zábavní a recitační večírek.

Veškeré dotazy buďtež zasílány p. Jindř. Podrazskému, obchodníku v Kladně X.

Súčastněte se v počtu co největším!

Jubilea kunveno de Esperantista Klubo en Brno okazis la 3.—5. de junio por festeni la dekan jaron, kiu pasis post la fondiĝo de la unua grupo esperantista en Aŭstrio („La bohemo-germana Aŭstria Societo Esperantista“ tiame fondita de s-oj K. Pelant, Steier k. a. disiĝis laŭ interkonsento en jaro 1905 je du kluboj nacilingvaj). La feston partoprenis krom la lokaj membroj kelke da gastoj el Bohemujo kaj Moravio kaj mem el Wien. Salutaj leteroj kaj telegramoj alvenis eĉ le Serbujo, Francujo kaj ankaŭ de doktoro L. Zamenhof. La unuan vesperon priparolis sinjoro Odložilík vojaĝon de studentoj de la loka komerca akademio al balkana insulo, ĉe kiu okazo faris al ili Esperanto bonajn servojn. La sekvantan tagon okazis publika propaganda parolado, aŭskultata kun intereso de pli multe ol cent personoj. La kunvenon, kiun malfermis prezidanto de la Klubo en Brno s-o Weisser, prezidis s-o Dr. St. Schulhof; kiel vicprez. estis elektitaj s-oj Macháček el Wien kaj s-o Socha, kiel protokolisto s-o Odložilík. Vespere, laŭ sciigo, kiun ni ricevis de la klubo, estis aranĝita debata kunveno, ĉe kiu aŭskultis la oratorojn ankaŭ multe da neesperantistoj. Post la programo la trian tagon veturis plimulto da gastoj al abismo Macocha. — **III. Kunveno de orientbohemujaj Esperantistoj** okazis la 21. de majo en Hradec Králové. Oni dankas precipe la laboron de

f-ino Melicharová kaj s-o Michálek, ke tiu ĉi festo, kiun partoprenis 70 gastoj, tiel bone kontentigis. El kelke da najbaraj urboj kunvenis la samideanoj por pasigi en amika rondo neforgesatan tagon. La programo anoncis prologon de s-o Michálek, recitaĵojn de f-ino Schulhofová (Printempa Kanto, Verda stelo), kanton de s-o Zach (Esperu, Mi amas vin), fragmenton el Hamlet kaj spritan komedion de Dr. Schulhof „La unua leciono", kiun prezentis membroj de la laborista societo. Poste sekvis parolado de s-o Dr. Fousek pri Esperanto kaj esperantismo. La delegitoj de najbaraj societoj prezentis fine siajn salutojn kaj raportojn. La plej interesan parton de la programo, teatran ludon, ni havos plezuron baldaŭ vidi ankaŭ ĉe okazo de aliaj festoj esperantaj; ĝia aŭtoro disponigis ĝin jam al la E. K. en Praha. — **Laborista Asocio Esperantista en Praha** (sekcio de la Laborista Akademio) aranĝis la 28. de junio en „Laborista Domo" membran kunvenon kun parolado de s-o J. Šídlo pri „Esperanto kaj socialismo". La oratoro pruvis, parolante pri la interna ideo de ambaŭ nomitaj movadoj, ke sole absoluta fideleco al Fundamento povas alkonduki al celo nian laboron kaj trafe aludis la ĥaoson inter la gloravidaj reformistoj. Tondra aplaŭdo rekompencis liajn vortojn. La Asocio estas tre grava faktoro en nia movado bohema; por pruvi ĝian agemon ni citas elementan kurson, kiun partoprenis 40 lernantoj ĝis la lasta, dudeka leciono. Kun same vigla intereso sekvis 80 lernantoj en la kamparo la kurson skriban, ĉe kiu la lecionoj estis al la lernantoj resendataj korektitaj. Post sia kvaronjara ekzistado havas la Asocio jam preskaŭ 200 membrojn kaj en kelkaj lokoj estas jam kreataj rondetoj laboristaj. La spezo estas 500 K. Por faciligi la monpagojn, ĝi aliĝis al la poŝta ŝparkaso. La plej gravaj decidoj pri la movado inter la esp. laboristoj estos pritraktitaj ĉe la unua kongreso de Laboristoj-Esperantistoj, kiu okazos dum la III. Kongreso Bohema. Jam kelke da gazetoj soc. dem. alportas regulajn rubrikojn pri Esp., danke la zorgon de la Asocio, kies fruktoriĉa laboro pruvas, ke nia Unio trovas en ĝi valoran kunhelpanton ĉe la propagando. Tiu ĉi forta organizacio fariĝos ankaŭ grava kunbatalanto en ĉiuj lingvaj demandoj. Ni deziras al ĝiaj gvidantoj plenan sukceson. *A-o.*

Nia fervora samideano s-o instruisto Krolmus en **Chržin** ap. Velvary anoncis al ĉiuj amikoj de nia laboro, ke la 16. de julio okazos publika ekzameno pri Esp. de liaj 12 lernantoj en la elementa lernejo. La invitiloj surhavis krom la programo de tiu ĉi festo gravajn datojn pri la historio kaj nuna stato de nia movado. En la nomo de protektanto de tiu ĉi ekzameno s-o inspektoro Plaňanský, kiu ne povis partopreni, salutis per bela parolado la gastojn s-o direktoro N. Smetana, aludinte la signifon de la festo, la unua tiuspeca en Bohemujo. La demandoj prezentitaj al la lernantoj estis respondataj perfekte kaj senerare: post la skriba kaj parola ekzameno sekvis demandoj eĉ pri la historio de Esp., kiujn la ekzamenatoj same bone respondadis. Inter la gastoj estis krom la gepatroj de la lernantoj ankaŭ samideanoj el Pchery, Kladno, Velvary kaj Kralupy. (Ni sincere bedaŭras, ke malfavoraj cirkonstancoj malfruigis la alvenon de kvar delegitoj el Praha.) Post la ekzameno atentigis s-o direktoro Smetana pri la esp. kurso, kiun s-o instruisto Krolmus malfermos la proksiman jaron kaj gratulis al li kune kun ĉiuj ceteraj. Al nia Majstro kaj al s-o inspektoro Plaňanský estis sendita letero kun sciigo pri la belega rezultato.

Ni aliĝas al la gratulantoj kaj deziras al nia estimata amiko, ke lia klopodo estu ĉiam rekompencata per tiel belaj rezultatoj kaj per tia kompreno. Lia tre bone sukcesinta provo estas grava paŝo sur la vojo, kiun ni celas — enkonduki la instruadon de Esp. en lernejon - ĉar ĝi estas unu el la unuaj!

E. K. en **Kladno** anoncas okaze de la loka jubilea laborista ekspozicio kunvenon de Esperantistoj, por kiu estas elektita la 27. de aŭgusto (dimanĉo). Por la esp. sekcio en la ekspozicio estas rezervita bona loko, al kiu tiras vian atenton granda afiŝo kun terglobo. La elmontritaj libroj, gazetoj, fotografaĵoj k. t. p. estas kun intereso foliumataj de la vizitantoj. Ni povas esperi, ke la laboro de la klubo ne restos sen kontentiga rezultato. — E. K. en **Radvanice** iniciatis fondi laŭ propono de sia prezidanto s-o Fr. Dvorník rondeton da amikoj, kiuj uzados en reciproka konversacio sole Esperanton, por ke ili perfektiĝu laŭ ebleco plej frue en scio de nia lingvo. (Oni bonvolu sendi por la kolekto de la nomita s-o esp. stampaĵojn, kovertojn kaj p. k. kun esp. surskriboj). — La klubo malfermis la 14. V. sian riĉan bibliotekon, kie estas je dispono de la membroj diversaj ludoj. Je fino de la jaro estos malfermita okmonata kurso. La kunvenoj okazas en rest. „U lípy" ĉiun mardon, jaudon kaj sabaton vespere. — La 24. de junio okazis en **Kukleny** bela festo, anoncata per grandaj afiŝoj: Parolado pri Esperanto kaj esperantismo; kanto-muzika akademio. Sian oratoran talenton valorigis kun bonega rezultato s-o K. Procházka el Praha. Sur la programo estis krom dek elektitaj muzikpecoj, recitaĵoj el poemoj de Dr. Schulhof kaj du kantoj esperantaj. Poste okazis lotado de esp. libroj. La sukcesa amuzo pruvas, ke nia movado en Kukleny estas en tre bonaj manoj kaj ke la klubo senlace klopodas pri sia elektita programo. — En Wien instruas en la bohema societo esp. s-o V. Jaroš 12 lernantojn (adr. VII. Lerchenfelderstr. 67). Prezidanto de la Bohema esp. Klubo en **Wien** s-o Karel Macháček parolis la 25. V. en la komercista societo Č. O. B. (X. distr.) pri „Esperanto por la komerco". La klubo dissendis al ĉiuj bohemaj societoj multkopiitan leteron kun informoj pri E. kaj invitis per ĝi la intersiĝantojn en sian kunvenejon 7. Neubaugürtel 40, kie okazas la regulaj vendredaj kunvenoj. — Treutilan ekskurson entreprenis la E. K. en **Č. Budějovice,** kies membroj ekskursis kune kun ĉiuj samideanoj el **Zlatá Koruna** al Č. Křemže, kie oni atentigis en ĝardena restoracio pri E. per ampleksa ekspozicio de poŝtkartoj kaj preskaŭ ĉiuj gazetoj esp. Granda flago super la enirpordo altiris atenton de multaj; por la fondiĝanta rondeto esp. en Č. Křemže ĝi estis bonega reklamo. — En **Velvary** laboras diligente por E. s-o Smola, kiu gvidis tie kurson post parolado de s-o instruisto Krolmus el Chržín. Kelke da amikoj konstante interensiĝas pri la movado kaj ni esperas, ke klubo povos esti tie fondita.

Sciigojn el la ceteraj lokoj ni represos estonte.

Rimarko: La adresaro de bohemaj korespondantoj estas finpresota tuj post apero de tiu ĉi kajero de nia revuo kaj ĝi estos dissendita al ĉiu enskribito. Ĉuj pli grandaj societoj esp. fremdlande ricevos senpage po ekzemplero.

Oni povas ankoraŭ akcepti anoncojn: 1/2 pĝ. 8 K, 1/4 pĝ. 5 K, 1/8 pĝ. 3 K.

Knihovna svazu „Ligo de Bohemaj Esperantistoj" obsahuje již 80 svazků.*)

č. 38. M. Jókai- *Du noveloj* (93 pĝ.);
č. 39. Bar. de la Motte-Fouqué-Myslik: *Ondino* (55 pĝ.);
č. 40. Vermandere-O. v. Schoor: *Formortinta Delsuno* (118 pĝ.);
č. 41. Naville-de Saussure: *La devo* (152 pĝ.);
č. 42 Mistral-Champion, Dr. Noël: *Mirejo* (72 pĝ.);
č. 43 *Literatura Almanako de L. I. 1910* (73 pĝ.);
č. 44 Rusiñol-Sabadell: *Folioj de la vivo* (106 pĝ.);
č. 45. Privat: *Du paroladoj* (15 pĝ.);
č. 46. Vavris: *Sherlock Holmes en servo de la hispana trono* (42 pĝ.)
č. 47. Limones: *Veneno*, orig. unuakta komedio (30 pĝ.);
č. 48. Morisson-Mann: *Dr. Jekyll kaj s-o Hyde* (94 pĝ.);
č. 49. Dr. Corret: *Kongreso en Barcelono* (72 pĝ.);
č. 50. D' Estournelle-Esselin: *Limigo de l' armadoj* (51 pĝ.);
č. 51. *Rakonto kaj aventuro* (31 pĝ:):
č. 52. Čefeč: *La elementoj de la vortfarado esper.* (64 pĝ.);
č. 53 Thiaucourt-Lorena grupo: *Unu jaron pli malfrue* (32 pĝ.);
č. 54. *Esp. gvidlibro tra Bosnio kaj Hercegovino* (34 pĝ.);
č. 55. Bossuet-Bastien: *Funebra parolado pri Louis de Bourbon* (69 pĝ);
č. 56. Cases: *Mistera Krimo*, unuakta komedio (37 pĝ.);
č. 57. Tomič: *La vojo al vero*, orig. (36 pĝ.);
č. 58. Dunant-Vaillant, Fruictier: *Rememoroj pri Solferino* (83 pĝ:);
č. 59. Antido: *La construction logique de mots en Esp.* (83 pĝ.);
č. 60. Morris: *Mia nuna sintenado pri la apendicito* (16 pĝ.).

Členům svazu zasílají se knihy za náhradu poštovného na dobu 14 dnů. Adresujte redakci Č. Č. E.

Zašlete ihned přihlášku ke III. kongresu českých Esperantistů. Legitimace (2 K) opravňuje k účasti na konferenci rakouských Esp. a jest vstupenkou k divadelnímu představení. Legitimace pouze ke schůzím rak. konference 1 K. Vstupenka k div. představení 50 hal. Zašlete obnos ve známkách kanceláři Ústř. Svazu Bohema Unio Esperantista v Praze II., Vodičkova ul. 38.

KORESPONDANTOJ: *52. S-o Matzkó Gyula, *Budapest*, Víg-ut 4. — *53., 54. F-inoj Helene Hasse kaj Gertrud Hasse en *Nieder-Langenbielaŭ*. Prusa Silezio. — *55. S-ino Elsa Fabian, *Dresden-N.* Jordanstr. 9. — *56. S-o Willy Bürgermeister, *Wurzen*, Kömeritzpl. 1. Saksujo (il. k. krom el Praha). — *57. S-o Innokentij Serišev, pastro, *Krasnij Jar.*, Zabajkala oblast, Verhrendinskij uezd, Rusujo, Siberio (il. k.; let.; pri matem., religio, instruado, alkoholismo). — *58. S-ino V Levandovska, sekr. de Esp. Grupo Ruĝa Kruco en *Jalta* Krim, Rusujo. — *59. S-o Ant. Mathieu Flotats. *Tarrasa*. Galileo 165. Hispanujo. — *60. S-o Walter Heck. *Stendal*, Schönbeckstr., 19. Germanujo. — *61 S-o Plácido Sallent Sampere. artisto. Lista de Correos. *Tarassa*-Barcelona. Hispanujo. — 62. S-o Fr. Schaupp, *St. Pölten*, Ledererg. 6. N. Ö. (il. k. kolor.). — *63 S-o Fritz Günther, *Braunschweig*, Madamenweg, 142 p. Germanujo (ĉiam tuj resp.) — Ne deziras plu kor. s-o L. Ottofy en Manila.

---

*) Viz seznamy v roč. III. str. 12., 28., 77., 93. a IV. 22.

CO BUDEME ČÍSTI O PRÁZDNINÁCH? KION NI LEGOS DUM LA LIBERTEMPO?

Každý český Esperantista má ve své knihovně dosud vyšlé ročníky naší revue Časopis Českých Esperantistů, které poskytují bohatý výběr četby poučné i informativní.

Z obsahu:

I. Rememoroj de l' Esperantistino. La propaganda problemo solvita. Instruistoj kaj Esperanto. Niaj kongresoj. Delegacio. Esperanto — espero de blinduloj. Ruĝa kruco kaj lingvo internacia. La tutmonde konata bohema bierindustrio. Internacia helpa monsistemo. Perioda literaturo de Esperanto. „Poste sekvis la toastoj". 20-jara jubileo de Esperanto. Tria universala kongreso de Esperanto en Cambridge 1907. Tri reĝoj Vampiro. Unua legolibro. — **II.** Deklaracio de la esperantaj gazetistoj. Mnemoniko. Bohema scienculo Zenger. Esperanto ve školách. Legendoj de Praha. Svatopluk Čech mortis. Proponoj. Jubilea ekspozicio. Kunsido de slavaj Esperantistoj. Adiaŭ! Čtvrtý kongres Esperantistů v Drážďanech 1908. Esperantista Akademio. El vojaĝo al antipodoj. Kiel juĝas franca Esperantisto pri Bohemoj. Bohemaj superstiĉoj kaj kutimoj. Universala Esperanto-Asocio. La sepo en homa vivo. — **III.** Pri unu interesa provo kompensi lingvon internacian. Bohema gimnastika societo „Sokol". Remburitaj homoj. Same, kiel la homoj. La kiso. Jono idioto. Kristnaska nokto. Ĉu vi scias, ke . . . Gravaj eltrovoj. Dekreto de Kutná Hora. Naše „Fundamento". Tolstoj kaj patriotismo. El „Patro Kondelík kaj fianĉo Vejvara". I. Kongres českých Esperantistů. Esp. literatura, O důležitosti Esp. pro učitele. O důležitosti Esp. pro právníky. Význam Esp. pro český národ. Význam Esp pro turisty. Důležitost Esp. pro učence. V. Kongres Esp. v Barceloně 1909. Nigraj kirasuloj. El historio de okulvitro — **IV.** Jak založiti spolek Esperantistů. En ĝardeno de la mortintoj. Dr. L. L. Zamenhof. Francisko Lelíček en servo de Sherlock Holmes. Oranĝo. Základ Esperanta. Banloko Luhačovice. Turnov. Bohema aŭ ĉeha? La sankta milito. Germana pugno. VI. Kongres Esperantististů ve Washingtoně 1910. Pri la interna ideo de Esperantismo. Dr. Zamenhof en siaj verkoj. Fablo pri la ruĝa rozo. Internacia kongreso de la gazetistaro en Bruxelles 1910. Oficiala raporto pri la II. Kongreso de bohemaj Esperantistoj. Významná slova o Esperantu Ph. Dr. V. Rosický. Přehled důležitějších časopisů esperantských. Grafo L. N. Tolstoj mortis. La plibonigado (poemo). Mistera paperpezilo. La vojevodo (poemo). U. E. A. en Augsburg 1910. — **V.** Podrobný slovník česko-esperantský. Unu el la plej belaj tagoj de mia vivo. Jaký má význam rozhodnutí „Delegace"? Hlasy povolaných osob o „Delegaci" a „Idu". Nova vojo (poemo). Lastfoja instruado. Generalo Urso. Sen titolo. Terura mistero. J. A. Comenius (poemo). „Internacieco" de la sporto. Historio de Esperanto (Usono). La celo kaj signifo de la ekzamena komisio de B. U. E. Praktika telegrafio Pri la esperanta traduko de Biblio. Bohemoj sur tutmonda forumo.

En la ĝis unu aperintaj jarkolektoj estas krom tio abunda kvanto da raportoj pri la movado esperantista fremdlande kaj en nia nacio, bibliografiaj recenzoj, sciigoj pri la laboro de Centra Asocio Bohema Unio Esperantista, esper. informaj artikoj pri la

bohema nacio, la gramatika parto de lernolibro „Metodo de Kühnl“, utilaj konsiloj lingvistikaj en „Jazykový rádce“ k. a.

En la literatura aldono de la III., IV. k. t. p. jarkolektoj aperadas esp. traduko de la fama bohema romano „**Avineto**“.

Doplňte svou knihovnu!

Cena ročníku I., II., III. a IV. po K 2·50 vypl. (pro členy spolků B. U. E. po K 2·20 vypl.).

Eldonanto: Ed. Kühnl. — Presejo de Národní tiskárna a nakl. JUDr. Edvard Jan Baštýř a spol. Praha.